Rudolf Alexander Schröder,

# Al la dianto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ho dianto, rozfratin',
vi stel-cirklo ronda, vere
firme kaj eĉ pli fiere
vi ja scias fermi vin.

Vian koron montras vi;
sed du flamoj ruliĝantaj,
konvulsie langumantaj
arde brulas super ĝi.

Spic-odoron, fajron vi
portas kvazaŭ el-infere,
tamen ŝvebas en-aere[2]
kiel flirta papili'.

Floras, kara amikin',
ĉiam ĉe l' fenestro bele,
akompanas vi fidele
tra la tuta jaro min.

*Traduko de la Germana poemo "An die Nelke" de* Rudolf Alexander Schröder *(∗1878-01-26 – †1962-08-22) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-781-1565 (2013-01-19 13:52:21)*

[2] aŭ:
tamen ŝvebas vi leĝere
kiel bela papili'.